La Katedralo de S.ta Rumoldo estis konstruita fine de la XII-a jarcento, krom la giganta turo, alta 97 metrojn, kiu datiĝas nur de 1339 ĝis 1530. Oni intencis starigi turon tian kia de la antverpena ĉefpreĝejo, sed pli altan (150 m.) La turo ankaŭ estas konata pro la fama lunbrulo, kiu baptigis la Mehlenanojn « Maanblussers » (Lunestingantoj!), pro la glora sonorilaro kaj ĝiaj koncertoj.

Interne de la Katedralo: du belaj pentraĵoj de Van Dijck, aliaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj, la Relikvujo de l' Mehlena Patrono, S.ta Rumoldo kaj la tombo de la konata Kardinalo Mercier, en speciala kapeleto.

Sudokcidente la la Granda Placo troviĝas la Skabendomo (1374), aktuale la urba arkivejo en kiu kolektigis vera trezoro de historiaj kaj folkloraj paperoj; laŭ la Kateljnestr., ni aliras la Preĝejon de S.ta Katarino (1336-1420), altgotika, kiu enhavas plurajn artajn skulptaĵojn kaj pentraĵojn.

Tie ni eniras la Beginejon, labirinton de multaj kaj pentrindaj kurbaj stratoj, paradizon de l' pentristoj kaj la urban parton, kiuj plej trafe konservis



## LA BOVOĈAR' (DIE OSSEWA)

SUD-AFRIKA POPOLKANTO

*D Malrapide*

Ve-nu al la ma-is-kamp',      ki-e pre-fas bo-vo-  
Dol-ĉe i -ru sen-ra-pid'      Pro del' bo-vo la la-

ĉar';      Ve-nu al la ma-is kamp',      La  
ciĝ';      Dol-ĉe i -ru sen-ra-pid'      Ja

bo-vo-ĉar' ŝarĝ-ig-is jam! In u vi, bo-vo-ĉar', in- u  
bal-daŭ est-osi-a-re-vid'!

vi, Ir- u vi, bo-vo-ĉar', ir- u vi; Sci-as

mi pri vi-a cel'; Al la hej-mo vi-a pel'. Ir- u

vi, bo-vo-ĉar', in- u vi, Ir- u vi bo-vo-ĉar', in- u vi

**LA BOVOĈAR'**

Venu al la maiskamp',	Dolĉe iru sen rapid',
Kie pretas bovoĉar';	Pro de l'bovo la laciĝ' ;
Venu al la maiskamp',	Dolĉe iru sen rapid',
La bovoĉar' ŝarĝiĝis jam !	Ja baldaŭ estos la revid' !

**Rekantajo :**  
Iru vi, bovoĉar', iru vi,  
Iru vi, bovoĉar', iru vi ;  
Scias mi pri via cel' :  
Al la hejmo via pel'.  
Iru vi bovoĉar' ,iru vi.  
Iru vi, bovoĉar' ,iru vi.

*Tradukis : Eco.*

Supra kanto kun muziko estas acetebla ĉe F.E.I. (P. van Humbeckstr. 3, Brussel-W. poŝtkonto 3263.51) po 2 fr. Ni instigas la sekciojn de F.L.L.E. mendi kvanton por disvendado en la kunveno. Ĉiu Ligano kaj precipe ĉiu Kongresano sciu parkere « La Bovoĉar' » !

sian antikvan karakteron. La begina preĝejo prezentas unu el la plej belaj konstruaĵoj en moderna flandra stilo (XVIII-a jarcento) en Rubensa baroko kaj multnombrajn skulptaĵojn, pentraĵojn; ĝi estas antikva trezoro, vera muzeo!

Forlasante orienten la Grandan Placon, ni renkontas, sur la Veemarkt, la Preĝejon de S.taj Petro kaj Paŭlo, iama jezuita preĝejo (XII-Jarcento) en Rubensa baroko; en ĝi, belegaj skulptaĵoj kaj tuta serio da pentraĵoj pri la aventura vivo de S.ta Franciska Xaverius, ĝia antaŭa patrono. Rigardu maldekstren la Kolegion de S.ta Rumoldo, kun ĝia triobla fasado de 1640 (Lukaso Faid'herbe).

Dekstre ni penetras en la Keizerstr.: flanke de la preĝejo de S.taj Petro kaj Paŭlo, la Urba Teatro, parto de la iama palaco de Margareto de Yorko, la tria edzino de Karolo, la Sentima. La sekva konstruaĵo estas la Urba Malsanulejo; plifruge ĝi estis la palaco de l' imperiestro. Fronte al ĝi, jen la Juĝejo, la iama palaco de Margareto de Aŭstrujo, kie ŝi edukis sian nepon, Karolon la Kvinan; la fasado de la Juĝejo estas la unua renesanca konstruaĵo en okcidenta Eŭ-

ropo. Kvindek metrojn distanca, staras la Evangelia Preĝejo (gotika stilo el la XIII-a jarcento), kies turon oni forprenis. Antaŭe estis la « Pasantoj-gastejo », kie tranoktis la pilgrimantoj al Romo aŭ aliaj lokoj.

Kiam ni forlasas la Grandan Placon laŭ la Frederik de Merodestr., ni tuj alvenas apud la Preĝejo de S.ta Johano en simpla brabantia altgotika stilo (1440-1483). La ligna supraĵo de ĝia turo estas tiu de la malnova turo de S.ta Rumoldo; ankaŭ ĝi enhavas multajn belajn skulptaĵojn kaj pentraĵojn, i.a. « la Adorado(n) de l' Tri Reĝoj » de Rubens.

En la sama strato, iom pli fore, troviĝas la Kortego de Busleyden aktuale Urba Muzeo: pentraĵoj de Rubens, Vinckebooms, Wierds ktp. kaj skulptaĵoj, folkloro salono, k.s.

Ni fine menciuj la Episkopan Muzeon en la Schoutetstr., kie oni kolektis ĉion kio speciale rilatas la religian vivon de la iama kaj ankaŭ de la moderna Mehleno...

Ĉu vi agrable promenis? Ni, ĉiukaze, deziras al la estontaj kongresanoj ke ankaŭ ili kunportu ion de la multaj, ĉiuspecaj belajoj de la trankvila, mirinda Mehleno!

XII-a Kongreso de Fl. L. E.

Mechelen, Pentekoston 1947  
(24-25-26 majo)  
II-a KOMUNIKO

Karaj Gesamideanoj!

Jam venis la tempo anonci vin senprokraste por nia dua granda postmilita renkontiĝo: la 12-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista en Mechelen.

Al vi fidelaj kongresvizitantoj, al vi karaj eksterlandaj gastoj, kaj tutspecialle al vi novuloj de niaj kursoj kaj radio-kurso ni direktas koran bonvensaluton!

Dum Pentekosto venonta vi ĉiuj ĝuos neforgeseblajn tagojn, ĉar la kongreskomitato certigas al vi kelkajn unikajn aranĝojn kiuj rompos iom la tradiciojn de niaj ĉiujaraj kongresprogramoj, sed kiuj igos la programon de nia 12-a Kongreso despli alloga!

Por filatelistoj kaj kolektantoj de Esperanto-memoraĵoj ni jam havas gojigan novaĵon: okaze de nia Kongreso estos eldonita speciala memoriga karto, kun kontraŭtuberkuloza poŝtmarko, figuranta la blazonŝildon de Mechelen stampita okaze de nia Kongreso per speciala poŝta stampilo kun teksto en Esperanto. Mendu tuj kelkajn tiujn kartojn! La eldonkvanto estas limigita kaj ni notos la mendojn laŭ la alvendo! Tiujn kartojn, kiuj havos specialan valoron filatelan kaj memorigan, vi uzu por saluti viajn nepartoprenantajn amikojn kaj korespondantojn. Ili kostas po 5 bfr. aŭ po unu internacia respondkupono pagota al la kongresa kasisto.

Ni cetere planas grandan kaj imponan Esperanto-ekspozicion en la intima honorhalo de la Urba Teatro. Ĝin kompetente prizorgos Flandra Esperanto-Instituto.

La Esperanto-feston de la dimanĉa vespero prizorgos la Esperantista Kabaredo de sekcio Brugge de Fl.L.E. Kiu ĉeestis la belegan feston de nia pasintjara Kongreso jam havis okazon aplaudi la Esperantistan Kabaredon kaj certe ne preterlasos la okazon revidi tiun trupon kun tutnova programo!

Al la venonta numero de F.E. ni aldonos la kongresaligilojn kun la detalaj prezroj pri hoteloj, manĝoj, ekskurso ktp. Dume ne prokrastu la pagon por via kongreskotizo! Aliginto kiu hazarde ne povus ĉeesti la kongreson tamen ricevos ĉiujn kongresdokumentojn, inkluzive de unu foto de la kongresanoj.

La kongreskotizo kostas por F.L.L.E.-anoj 40 fr., por gastoj 50 bfr., por eksterlandanoj la egalvaloron de 50 bfr. (por nederlandanoj 3 gld. pageblaj pere de nia Repraŭntanto: NEDERLANDA ESPERANTO-CENTRO en Roterdamo).


Adreso de la kongresa oficejo: Geerdegemvaart 69, Mechelen. Kotizojn kaj antaŭpagojn por la memorigaj kartoĵoj oni pagu pere de poŝtkonto 51.13.14 de kasisto M. Goedgezelschap, Mechelen.

Faciligu nian taskon aligante plejeble baldaŭ kaj precipe propagandante nian kongreson inter la flandraj kaj alilandaj esperantistoj!

La Organiza Komitato.



MECHELEN: Carma vidaĵo.



MECHELEN: Tureto de la Seminario.



**Plaatselijk Nieuws**

**V.E.B. Afdeling ANTWERPEN.** — Op 13 Januari jl. werd de algemene vergadering gehouden waarop gedetailleerd verslag werd uitgebracht over de bedrijvigheid tijdens 1946. Het bestuur werd gedeeltelijk gewijzigd. Als voorzitter werd aangesteld dhr. J. Jacobs, als tweede sekretaris dhr. Timmermans, als feestbestuurder dhr. Volders.

Dr. T. van Gindertaelen, gewezen voorzitter die zich wegens zijn veelomvattende Esperanto-bedrijvigheid niet meer kandidaat had gesteld, stuurde een hartelijk dankwoord tot de aanwezigen en wenste zijn bevoegde opvolger een succesvol en vruchtbaar voorzitterschap.

De lidgelden voor 1947 werden vervolgens vastgesteld.

Vervolgens werd een kalender van voordrachten in of betreffend Esperanto vastgelegd: 17 Febr. Mej. Hofkens, 17 maart dhr. De Boes, 21 April dhr. Lodema, 19 Mei dhr. Vermuyten, 16 Juni dhr. Jacobs, 21 Juli dr. van Gindertaelen. Op 30 Juni een « letervespero ».

**V.E.B. Afdeling BRUGGE.** — Op 16 Januari jl. werd de algemene jaarvergadering gehouden. De bestuursleden brachten om beurt uitvoerig verslag uit: dhr. E. Debaets (kursussen en examen), dhr. Gr. Maertens (propaganda), dhr. F. Roose (bulletin « Paco kaj Justeco »), dhr. R. Martens (bibliotheek). Om te sluiten gaf de voorzitter een algemeen en humoristisch overzicht van onze grote bedrijvigheid tijdens het voorbije verenigingsjaar. Vervolgens werd overgegaan tot het aanstellen van de bestuursleden voor 1947.

**V.E.B. Afdeling OOSTENDE.** — Deze voor de oorlog onder leiding van onze betreurde Jan Roelands zo bedrijvige en bloeiende afdeling werd heropgericht. Nauwelijks van wal gestoken speelt een gunstige wind in de zeilen van de afdeling: in de Leopoldschool volgen 30 leerlingen de cursus van leeraar Pintelon. Eerlang komen ze de afdeling versterken. Belangstellenden en nieuwe leden kunnen zich steeds aanmelden bij bestuurslid W. Vantournhout, Bouwmeesterstr. 7.

**Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj**

**PREMIO:** Post la 19 a enigmo akiris 7 poentojn: Sanoj Bernaert, Iserentant, Marmenout kaj Sano M. L. Roose. Inter ili la loto decidis kaj Sano Iserentant el Brugge gajnis la premion: « De Pago al Pago » de L. Totsche. Ni gratulas!

**SOLVO DE LA 20-a ENIGMO.**  
**HORIZONTALE:** 1. troy; puŝ; ha. — 2. rok; delir. — 3. id; pun; pini. — 4. polemik; ban. — 5. dat; kul; je. — 6. legol; poeto. — 7. in; las; gri. — 8. edz; variant. — 9. rel; luk; ge. — 10. banal; nan. — 11. alumet; suid.  
**VERTIKALE:** 1. trip; tie; da. — 2. rododendr. — 3. ok; lag; zebu. — 4. petol; lam. — 5. dum; lav; ne. — 6. penik; salat. — 7. ul; kup; rul. — 8. ŝip; logik. — 9. rib; era; nu. — 10. najtingal. — 11. alineo; tend.

**N-ro 21: SILABENIGMO.**  
 El la subaj 36 silaboj formu 12 trisilabajn vortojn (ne ĉiuj estas radikvortoj),

respondantaj al la sekvantaj difinoj. Legu la unuajn literojn de supre malsupren, poste ankaŭ la kvinajn literojn de supre malsupren. Tiam vi trovos proverbon el la Zamenhofa Proverbaro.

**Difinoj:** 1. Esti en iu loko, kiam io okazas. — 2. Malbona stato de iu korpo, karakterizata de svelto, ruĝeco kaj doloro. — 3. Administranto de granda Komunumo. — 4. Kortbirdoj. — 5. Loko, en kiu mankas plena lumo. — 6. Malpura loko sur io. — 7. Forigi kuglon. — 8. Li troviĝas proksime de ni. — 9. Ili naĝas, tamen ne estas fiŝoj. — 10. Fariĝi. — 11. Devigi iun foriri el sia patrujo. — 12. Ekstera flanko de iu korpo.

**Silaboj:** ba. bes. boj. bra. ce. coj. ĉe. ek. ek. es. fi. fla. in. jo. jo. ka. ko. ku. li. lo. lom. ma. mo. naj. o. om. pa. pra. ro. su. ta. ti. tro. ur. zi. zi.

La solvon oni sendu sur aparta folio al POSTBUS 342. BRUSSEL, antaŭ la 15 a de marto.

**ĈAPITRO 20-a**

«Do, sinjorino Steinmann komencis ofensivon?» rimarkigis Doktoro Gulopez, post kiam Kant komunikis la deklaron de Alex.

«Jes, sed kial? Memvole neniigi perfektan alibion tute sensencas!»

«Ankaŭ mi ne komprenas, escepte...»

«Escepte...?»

«Se ĝuste Alex kaj lia patrino diris la veron kaj se Profesoro De Groot...»

«Doktoro Gulopez ne findiris sian penson.

«Se subite la jaĥto alfundiĝus, ni ĉiuj malsekus?», Kant ironiis. «Mi estas konvinkita ke la familio Steinmann krake mensogas, sed kial, kial?... Cio havas motivon, do ankaŭ tio. Mi nepre malkovru ĝin.» Li malŝtopis sian pipon kaj rigardis la ŝaktabulon antaŭ la hispano.

«Ha! vi imitis la partion, kiun la notario aludis. Ĉu ĝustas?»

«Almenaŭ tion la notario ne mensogis. Li efektive eraris en la 39-a puŝo; sufiĉe komplika kombino. Kiom mi konas lin kiel ludanton, li pasigis minimume tutan horon pri ĝi.»

«Koncerne ŝakludadon, Doktoro, mi volus fari al vi demandon iel strangan.»

«Vere?»

«Ĉu ekzemple vi povus ludi bonan partion antaŭ la plenumo de murdo de tate preparita?»

Doktoro Gulopez rigardis rekte en la okulojn de Kant.

«Jes, mi opinias ke mi povus tion. Mi almenaŭ supozas tion, ĉar mi koncedas ke mi ne scias kia sin sentas murdanto, ĝuste antaŭ sia krimo.»

«Hieravespere vi ludis kontraŭ diversaj sinjoroj. Ĉu eksterordinare nervoza aŭ malbona ludado de unu el ili ne frapis vian atenton?»

La ŝakmajstro longe pripensis antaŭ ol respondi.

«Estas fakto ke vere neniu bone ludis. Ankaŭ via ludo ne estis kia ĝi devis. Koncerne miajn kontraŭulojn, ili nenion taŭgis; nur Majstro Van der Meersch estis meza.»

«Do ankaŭ tiu ĉi vojo ne helpas. Mi proponas ke ni serĉu lumon ĉe la nobelaro. Ĉu ni kune petu aŭdiencon?»

La grafo ree montris glatan vizaĝon, sur kiu oni ne povis decifri ĉu oni bonvenas aŭ ne. Li afable akceptis ilin, kvankam iom supere. Li tamen levitis la dekstran brovon, rimarkante ke ĉi-foje Kant ne estas sola. La grafino ankoraŭ ĉiam pristudis la saman revuon.

«Tamas pri la bruo, kiun vi ĉi-nokte aŭdis,» Kant ekis. «Estis Alex Steinmann, kiu tumultis. Li verŝajne falis. Ĉu vi ne scias aŭ ne povas dedukti de la aŭdita bruo, ke iu helpis lin?»

La grafo pripensadis kaj tiam kapskue neis.

«Ne, Inspektoro, kiel mi jam diris mi ne speciale atentis la incidenton.»

Kant demande rigardis la grafionon.

«Ankaŭ mi ne, ŝi deklaris. «Mi nur aŭdis malklarajn voĉosonojn kaj kriojn, kiujn sekvis du da surdaj battoj, kiel se iu pugnobatis pardon. Ankaŭ mi ne povas diri pli.»

«Damage», Kant sopiris, «tio eble gravis, sed mi ne bonŝansas.»

«Pardonu min, Sinjorino,» demandis Doktoro Gulopez, «sed ĉu vi scias ke sinjoro Maxton iam ricevis karceropunon?»

Mirego mutigis la grafan paron. La grafo paliĝis de indigno.

«Kial vi enmiksas vin tie ĉi, Doktoro Gulopez?»

Kant tuj intervenis. «Doktoro Gulopez kunlaboras en la klarigo de la dramo sub mia respondeco.»

«Sed, Sinjoro Kant, kial oni povas fari tiajn demandojn? Sinjoro Maxton estis ja plena gentlemano!»

«Ni malgraŭe ekaŭdis ion tian. Tio sendube jam longe pasis, de kiam sinjoro Maxton ankoraŭ restadis en Ameriko. Lia filino eble rakontis ion similan al la grafino?» Li demande rigardis ŝin.

«Mi ne povas kredi ke la mortinto iam faris ion puneblan. Ĉiukaze Elly neniam parolis al mi pri tio. «Ĝi falde fermis la revuon.» «Tamen, ŝi foje ra-

**JAĤTO VETURAS EL...**

«KRIMINALA ROMANO»

Tradukis: Dro T. Ken.  
 Verkis: Deck Dorval.

kontis al mi ke, post periodo de relativa prospero, sia patro tre matriĉigis. Estis proksimume kiam ŝi naskigis kaj kiam, iom poste, ŝia patrino mortis. Sinjoro Maxton tiam estis trompoŝteita de sia oficisto, asociano aŭ iu simila, mi ne scias. Elly eksciis tion nur de sia patro. Kiam ni ekkomis lin, li jam estis tre riĉa viro.»

«Ĉu lastatempe li ankoraŭ faris negocojn?»

«Jes, sed sole borsoperaciojn por propra konto. Post la morto de Elly, li forlasis ĉiujn asociojn.»

Kant montris la tri fotojn el la leturo de Maxton kaj ankaŭ kiujn li trovis en la kofro.

«Ĉu iu el vi eble konas personojn sur tiuj ĉi fotojn?»

La grafino tuj esprimis sian opinion: «Tuj ĉi du sendube prezentas Elly Maxton, kiam ŝi ankoraŭ etis, pri tio mi nepre ne dubas. Sed tiujn ĉi personojn mi neniam vidis. La vizaĝo de la viro certe ŝajnas al mi iel konata... sed tio tiel oftas. Ne, mi konas nenion el ambaŭ. Kaj vi, Hector?»

La grafo manprenis la du bildojn kaj malrapide skuis la kapon.

«Nekonataj. Neniam renkontitaj.»

«Tiam mi timas ke ni vane ĝenis vin. Ekskuzu nun. Ĉu ni povas deziri al vi bonan nokton?»

Ege senkuraĝiĝinte, Kant pilotis Doktoron Gulopez al sia kajuto. La sorto reale ne favoris lin. Senkompate la tempo iris plu. Progreso urĝis, se li volis plenumi sian promeson al Yvonne kaj Gulopez. Jam vesperiĝis. Baldaŭ la nokto venus kaj kion li tiam farus! Cerbumi... cerbumi... ade cerbumi... Li invitis sian helpanton ke li sidigu kaj metis la kvar fotojn apud la aliajn aktojn.

«Tio verŝajne ne tre utilis, sed mi tamen volus scii kiuj estas tiuj ĉi personoj. La virino, jes, eble la edzino de Maxton. Sed la jena barbulo?» Li klinis sin super la flaviginta portreto. «Li ne estas Maxton mem. Tiu ĉi estas pli malgranda. La proporcioj de la membroj signas tion. Laŭ la vestoj, la aĝo proksimume kvardek jarojn aĝas. Nomo kaj adreso de la fotografo preskaŭ ne plu legeblas. J.S. Graham, Cherry Street 12, New York. Tio malkovras nenion al ni. Nu, mi rezignas, mi ne scias.»

«Aktuale viroj kun barbo maloftas, Sinjoro Kant!»

«Estas vere! Ili eĉ devus prunti dentojn!»

Kant miris ke li ankoraŭ povas ŝerci. Tamen, la observo de Doktoro Gulopez subite vekis ion en li. Li metis paperejon sur la subon de la barba vizaĝo. Skuo trairis la pezan korpon.

«Doktoro Gulopez, foje pristudu la viron tra lupoo, nun, tiel. La barbo mistifis min. Kaj krome, la foto estas tiel malnova.»

Doktoro Gulopez pleje streĉis la rigardon, sed ne akiris rezultaton.

«Ĉu vi scias kiu li estas?» li scivole demandis.

«Kiu li estas? Mia nomo ne plu estu Kant se li ne estas nia granda amiko Steinmann. Li, kiu asertas ke li konas Maxton nur duon da jaroj! Doktoro Gulopez, lumo levigas en mi!»

«Mi admiras vin, Sinjoro Kant. Nun kiam vi diris tion, ankaŭ mi rimarkas la similecon. Sed se Steinmann mem neus, kion tiam?»

«Mi ne donos al li la okazon nei. Venu.»

Kaj antaŭ ol la ŝakmajstro plene komprenis la intencan de Kant, ili staris ĉe la kajuto, en kiu la juna Steinmann estis enfermita. Tiu ĉi vere malafable akceptis ilin. Eĉ antaŭ ol Kant povis meti demandon, li tuj eldiris ke li ĉion konfesis kaj ne deziras pluan ĝenon. Li evidente ricevis striktajn instrukciojn. Li nur volis ekscii ĉu li ne povas reiri al sia kajuto. Oni, se necese, enfermu lin

en ĝi. Ĉi tie neniel estis intime.

La inspektoro kviete lasis lin finparoli.

«Nu, kompreneble. Sinjoro Steinmann, tiam vin pli longe tie ĉi fakte ne plu havas miltan sencon. La ŝtelo... nu, jes... Via kroma alibio enordas, kvankam io ne kongruas en viaj deklaroj.»

La juna viro tuj reagis.

«Vi forgesas ke mi tro ebruis por havi klaran vidon.»

«Ho, jes, ne plu tre gravas. Mi nur volis scii ĉu tiu ĉi reale estas mainova foto de via patro. Se jes, la afero estas aranĝita.»

Doktoro Gulopez pene sukcesis kaŝi sian streĉon. Alex Steinmann nenion hezitis.

«Sed ĝi kompreneble estas foto de mia patro.»

«Kiel vi tiel certas? Vi ja neniam konis lin tia. La bildo antaŭas vian naskiĝon.»

«Jes, sed hejme, en la laborĉambro de mia patro, pendas pligrandigita kopio. Estas mia patro, nepre.»

«Bone, mi ne dubis, sed tamen mi volis certi. Nun, mi enordigos vian aferon, Sinjoro Steinmann, iom da pacienco.»

Dum ĉi tiu mallonga pridemandado, neniu muskolo kuntiriĝis sur la vizaĝo de la inspektoro. Nur kiam ili ekstere staris, li signife ridetis.

«Kaj nun viciĝu la patro. Mi scivolos ĉu li rekonos sin mem. Venu, ni subeniras.»

«Atendu, se mi ne eraras li staras tie, sur la malantaŭa ferdeko.»

«Tiom pli facile. Mi preferas renkonti lin sola ol kun lia edzino.»

La maljuna Steinmann kliniĝis sur la pavezo kaj ŝajne atentis nur la helice kiritan akvon. Iom post iom mallumiĝis. Ne plu ventis. La ĉiela volbo purpura bluis. Sole en la fora okcidento, kie la suno subiris, la horizonto sange ruĝis. La kolera ŝvingo de la duonkonsumita cigaro en la maron evidentigis ke Steinmann ne ĝuas la naturbelon.

«Bonan vesperon, Sinjoro Steinmann.»

Unuskue la industriisto turnis sin. Lia vizaĝo havis malagraban esprimon.

«Kion vi deziras?» li ofendiĝis.

«Nenion specialan.»

«Mi lacas de la tuta afero, mi scias nenion kaj nenion deziras aldoni.»

«Sed, Sinjoro Steinmann...»

«La diablo prenu vin!»

Kant restis ekstermezure trankvila, kio ege mirigis Gulopez.

«Nu, nu, kial nervoziĝi? Doni duon da informoj ne estas torturado. Por ĉiuj, ankaŭ por vi, rapida solvo gravas!»

«Mi lacas de la tuta kazo! Ĝi tedegas min! Ĝi ne koncernas min kaj ne volas ĝenon pri ĝi!»

«Via teniĝo mirigas min! Vi, kiu jam tiom longe konas Maxton.»

Gulopez notis la ŝanĝigon sur la fizionomio de Steinmann. Kant ŝajne nenion rimarkis kaj neglekte ŝtopis plian pipon.

«Kion vi celas? Tiom longe mi ne konas lin.»

«Tamen, tamen... kvardek jaroj estas ja longa tempo, ĉu ne?»

«Kion vi scias pri tio?» Steinmann rebatis kiel skermisto, kiu serĉas breĉon.

«Vi konas Maxton de kiam vi ambaŭ estis en New York; jam tiomomente vi estis bona amiko de la mortinto!»

Doktoro Gulopez ne komprenis kial la vizaĝo de Steinmann sereniĝis. Ankaŭ Kant momenton timis ke li diris tro al la viro.

«Vi ŝajnas bone informita!»

«Meze. Mi scias inter aliaj ke vi tiam havis barbon kaj ke vi laboris kun Maxton en la sama entrepreno.»

La fora pafo trafis; la trajtoj de Steinmann iĝis pli malmolaj.

«Iel, jes... venu,» li diris, «ĉu ne pre-

ferinde aliri la salonon?» Li evidente volis gajni pensotempon. Kiam ili eksciis, li reve rikongiĝadis antaŭ sin ĝis Kant revenigis lin al la temo.

«Ĉu vi ne povas komuniki al ni kelkajn detalojn pri viaj tiamaj riatoj kun la viktimo?»

«Ive, neniajn kaj ili cetere neniel gravus.»

«Eble! Mi tamen volus scii la motivon de la kondamno de maxton.»

La kolerio de la industriisto denove ŝajnis minaca, sed li tamen sukcesis regi sin.

«Vere, Sinjoro Kant, se vi scias ĉion ĉi, vi certe estas informita ke temis pri misuzo de riĉo kaj trompoŝteito de mono. Pro kio tiel fosi en la pasinteco de mortinto?»

«Ies pasinteco ĉiam gravas en enketo. Vi, kiel intima amiko, nepre devas scii pri tiu mispaŝo?»

La vizaĝo de Steinmann ree sereniĝis kaj li farigis pli cedema.

«La kazo ne estis peza. La ĵuĝistoj vere troigis. Temis nur pri proksimume du mil dolaroj, kiujn Maxton verŝajne perdis en eraraj spekuloj. Li ne plu kapablis pagi siajn kreditorojn en la oportuna momento kaj la tuta malfeliĉa afero brutiĝis. Tiam Maxton estis ankoraŭ tre juna, kaj kiam oni estas juna... Sed, kiel mi diris, oni konsideris ĝin serioza kaj ĝi kostis al li du jarojn da karcerio. De tiam mi perdis lin el vido.»

Kant foreste tamburis la tablon per la fingroj.

«Ĉu Maxton sole respondecis? Ĉu li ne havis asocianon?»

«Mi momenton pripensu, ĉar tio jam longe pasis. H'm, mi ne tute certas, sed mi tamen kredas ke li estis sola en tiu komerco. Mi subalterne laboris por li.»

«Vi perdis Maxton el vido? Kiel vi do ree rilatiĝis kun li?»

«Hazarde, pro aferoj, nur pro aferoj.»

«Kiam tio okazis?»

«Antaŭ du da jaroj.»

«Pro aferoj? Sed mi kredis ke, post la morto de Elly, Maxton tute retiriĝis.»

«Jes, tio estas ke li ĉie demisiis kiel administranto, sed ankoraŭ amatoris en borsaferoj. Komencinte tiujn ĉi, oni preskaŭ ne povas lasi ilin.»

«Do, ne estis gravaj borsaferoj kiuj denove kontaktigis vin ambaŭ?»

«Sinjoro Kant, nun vi tuŝas privatajn aferojn kaj mi preferas ne detali ilin, precipe ĉar ili estas tute fremdaj al la dramo.» Steinmann froste parolis. Li reakiris sian memfidon. Tamen, lia kvieto ne daŭris. Li eĉ ektimis kiam la inspektoro koncize informis: «Femis pri akcio de la «Iron and Steel Corporation», ĉu ne?»

«Kiel vi scias tion?»

«Mi ekaŭdis ke Maxton grandskale aĉetis ilin.»

«Nu jes, estas vere. Lastatempe tiu ĉi entrepreno tre interesis lin.» Sekve, kiel se li subite rivelis la tutan veron, li konfidence aldonis:

«Mi estas unu el la plej grandaj akciuloj de la «Iron and Steel» kaj jam pli ol dek jarojn estras tiun ĉi truston. Mi ĉefe venis Eŭropon por trakti kun Maxton pri tiu ĉi afero.»

«Versajne temis pri tre grandaj sumoj?»

«Jesja, Maxton ne faris aferetojn.» Li ekstaris. «Vi ne koleru tial ke mi ne insistas.»

La blufa, glata tono incitis Kant. Kial la industriisto subite sentis sin tiel memcerta, male al lia ĵusa hezita angoro sur la ferdeko?

Maristo eniris la salonon.

«Jen, Sinjoro Steinmann, markonigrama por vi.»

La amerikano akceptis la paperejon. Eĉ ne rigardante ĝin, li rapide enpoŝigis ĝin.

«Ekskuzu min», li diris kun blankaj lipoj kaj, antaŭ ol Kant povis respondi, li jam urĝigis for.

(daŭrigota)

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond, Postbus 342, Brussel. --- Drukkerij: J. Van Laer, Oude Vaartstraat 104, Turnhout.